

Eldonantaro:
 Dr. Leono Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
 W. M. Page, advokato, Edinburgh
 Ernest Archdeacon, Paris
 J. Gill Norton, komercisto, Barcelona
 H. Fischer, grandindustriisto, Bucuresti
 Teo Jung, Horrem b. Köln
 Frans Schoofs, komercisto, Antwerpen (Anvers)
 P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

Tarifon
 por abono kaj reklamo vidu sur lasta paĝo!

Administrejo:
 (sufiĉa adreso)
 Esperanto Triumfonta, Horrem bei Köln, German.
Redaktistaro:
 Ĉefredaktisto: Teo Jung.
 Kunredaktisto: M. Butia.
 Literatura red.: Zanoni.
Kunlaborantoj
 inter la Esperantistaro de la tutmondo.
 Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero.
Tarifon
 por abono kaj reklamo vidu sur lasta paĝo.

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.
Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.
Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Antwerpen-Anvers, Barcelona, Bucuresti, Edinburgh, Horrem b.Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

La germana regnestro honora protektanto de la Dekkvina. Senpaga litova pasporto kaj rabato sur litova fervojo.

La malaperinta Ĉekbanko Esperantista.

Certe ĝi estis bona helpilo al la Esperantistaro por transpagi bagatelajn sumetojn, kaj oni povas kompreni, ke multaj samideanoj deziras ĝian refondon. Cetere ĝi havis grandan propagandan signifon por nia movado. Sed ĝi havis ankaŭ stajn mankojn: ĝia kontularo estis tro malgranda, nur eta nombro de la tutmonda Esperantistaro uzis ĝiajn servojn (malpli ol 1000); ĝia financa rezulto estis malbona, pro la tro etaj bonhavo kaj ankoraŭ pli etaj transpagoj de la kontuloj. Pro tio ĝis nun neniu el la Esp. bankistoj emis refondi la ĉekbankon. Alla argumento kontraŭ ĝia refondo estas la granda ŝanceliĝo de la kurzoj, kvankam la reenkonduko de la Spesmilo (bazanta sur valoro de duona dolaro) ĝuste nuntempe povus solvi tiun malfacilaĵon.

Kompreneble tiuokaze la (nevole) trompa kalkulado de entreprenoj en malbonvalutaj landoj devus ĉesi. Ekzemple, kiam negocisto hodiaŭ ricevas konton de 100 dolaroj aŭ ties egalvaloron, li povas hodiaŭ aĉeti por tiu sumo komercaĵojn, kiuj valoras 100 dolarojn, indiferece ĉu poste la valuto de lia lando falos aŭ ne falos. Multaj negocistoj en malbonvalutaj landoj tamen kalkulas alie: ili transkalkulas la 100 dolarojn en sian propran valuton, enskribas en la konton de la paginto ne 100 dolarojn sed egalvaloron en sia propra valuto. Kiam poste la valuto falas, la kontulo havas gravan perdon, kvankam la negocisto trompis lin nevole: la vera trompanto ja estas la ŝtato, kiu per preso de tro multe da papermono mem senvalorigas sian monon.

ET jam delonge ne sekvas tiun kutimon por siaj abonantoj. Ankaŭ ĝi enskribas la monon laŭ la kurzo de l' aventago en germana valuto, sed tuj ĉe la ricevo de la mono ĝi fiksas la nombron de la liverotaj numeroj, kaj tiu nombro ne estos ŝanĝata, kiam la valuto falos. Do estas neeble, ke la abonantoj povas perdi pro tio, ke ili antaŭpagis iun sumon.

Post kelka tempo ni intencas eĉ pli severe apliki tiun sistemon, fiksan la prezon unu fojon por ĉiam kaj por ĉiuj landoj laŭ stabila alta valuto: sviz.fk. aŭ spesmilo (duona dolaro), kaj donante en ET de tempo al tempo liston pri la egalvaloro en la valuto de la diversaj landoj, laŭ la aktuala kurzo. Tiam eble ni povus konsideri — kvankam

La Loka Kongresa Komitato por la Dekkvina sendis al ni kopion de sekvanta letero:

Büro des Reichspräsidenten.

Der Herr Reichspräsident erklärt sich gerne bereit Ihrem Wunsche entsprechend das Ehrenprotektorat über den 15. Internationalen Esperanto-Kongress in Nürnberg zu übernehmen.

In vorzüglicher Hochachtung
 gez. Meissner,
 Ministerialdirektor.

S-o P. Medem, Kaunas, komunikis al la Loka Kongresa Komitato:

„La Litova ministraro favoris al la kongresanoj senpagan litovan pasporton kaj por la fervojaj prezoj en Litovujo 75% rabaton.“

nia emo je tio ne estas granda — la eldonon de „ET-kuponoj“ po 10, 50, 100, 500 kaj 1000 spesoj (1/3, 2/3, 5, 25 kaj 50 usonaj cendoj), kiujn nia eldonejo akceptus ĉiutempe kiel pagon por abonoj kaj libroj, kaj kiuj povus servi ankaŭ por transpago de etaj sumoj inter samideanoj kaj kiel anstataŭaĵo de respond-kuponoj. Kondiĉo estus, ke la tuta Esperantistaro havus sufiĉan konfidon por senskrupule akcepti tiajn kuponon, kies valoro restus ĉiam la sama, bazanta sur spesmilo kiel duona dolaro. La kuponoj servus nur, kiel jam menciite, por pago de malgrandaj sumoj; ĉiujn gravajn pagojn oni efektivigus per banko.

Eventuale (anstataŭ ET) alia fidinda Esp. organizo povus eldoni tiajn kuponon, kion ni nepre preferus. La afero estas pripensinda.

Ĉi-sekvante ni publikigas ankoraŭ tri artikolojn pri la sama temo, kiujn ni ricevis kiel respondojn al la artikolo „Bankistoj atentu!“ de M. Jobé en ET 122 (Parolejo 150).

Bankistoj decidu!

Kiel bankoficisto mi profunde pripensadis la aferon de la nuna tre malfacila mensendado kaj rimarkante, ke laŭ mia opinio la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj tute ne taŭgas, nek al la uzado de la respond-kuponoj (Hungarlando, ekzemple, nun ne uzas ilin) nek al la sendado de postmandatoj, ankaŭ la reenkonduko de la metodo ĉefe havas mal-

Oficejo de la Prezidanto de l' Regno.

Lia moŝto la Prezidanto de la Regno volonte deklaras sin preta, responde al via deziro akcepti honorprotektan por la XV-a Internacia Esperanto-Kongreso en Nürnberg.

Kun eksterordinara respekto
 subskr. Meissner,
 ministeria direktoro.

helpojn, mi volas direkti la atenton de niaj fakuloj al metodo, kiu eble plifaciligas la monan interrilaton, ĝis la tempo de ordinara komunikado internacia.

Do mia propono estas:

1. Ni limitu la ekzemplon de ET, kiu havas en ĉiuj landoj abonlokojn, t. e. oni elektu en ĉiuj landoj bankon, kiu transprenus la taskon de rilata laboro.

2. Ĉiuj gazetoj, entreprenoj, institucioj, individuoj ktp. fiksas la abondon, kolizon ktp. — kiel ĝis nun — en la rilata valuto.

3. La samideano, kiu devas pagi iun sumon, pagas nur al la banko de sia lando rekte, kiu estas destinita por tiu ĉi lando. Do, ĉu mi abonas finlandan gazeton, ĉu mi ŝuldas al japana samideano, mi pagas la abonprezon de finlanda gazeto (publikigita en ĝi) same la egalvaloron de japanaj Yen en hungaraj kronoj, kiun liksas aŭ mi kun mia japana samideano aŭ la bankoj, ĉiam laŭ la tiama monkurzo jam antaŭe, al mia hungara banko X en la ĉeturbo. La hungara banko sendas leteron al la finlanda resp. japana banko, ke ĝi pagu al s-o Y tiom en la tiu mono, kiom egalvaloras la sumo enpagita en Hungarlando. Ni ĉiuj scias, ke la limtigo por la likvido estas malfacila afero, sed ĉu oni ne povus rigardi kiel limtagon la tagon de la elpago efektiva?

4. La banko donas al la paganto duoblan kvitancon. La unua estas ĉe la paganto, la duan li forsendas al la ŝuldanto. (La kvitancoj estas dulingvaj: en Esperanto kaj en la lingvo de la paganto.)

5. La bankoj likvidas kaj diskontas inter si unu kun la alia tiel, kiel nun estas kaj ĉiam estis la uzo rilate al fremdlandaj valutoj.

6. La nomaro de la bankoj tutmondaj, kiuj partoprenas en tiu ĉi laboro, estas publikigota per UEA en ĉiuj Esp. kaj nacilingvaj gazetoj kaj — ĉefe — ĉiuj bankoj povus doni klarigon en tiu rilato.

7. La sumon, kiun la banko postulus por sia laboro, fiksus la banko en akordo kun la samnacia Esperantistaro aŭ delegitaro.

8. La demando de la likvido, de la interrilato inter la bankoj mem, transprenus UEA per siaj delegitoj, ĝis la afero estus tute preta al efektivigo.

Nature la diritaj punktoj eble ne estas tute precizaj; sed eble mi sukcesis montri la ĝustan vojon, sur kiu irante kaj pridiskutante la detalojn oni fine povus ordigi ĉi tiun gravan demandon.

Do mi petas la samideanojn, precipe la bankistojn, ke ili scigu aŭ la gazeton ET aŭ s-on M. Jobé en Barcelona aŭ min, kio estas ilia opinio pri mia propono, kaj samtempe mi petas, ke UEA ankaŭ okupu sin pri ĉi tiu gravega demando, kiu ne permesas pluan prokraston.

Georgo Steiner,
 Kizarsir, 12,
 Győr (Hungari.)

„Mosa Banko“.

Ni trege bezonas propran bankon, sed ĉar la kurzaj diferencoj de diversaj monunuoj estas tiom grandaj, ni tute ne povas apleni unu monunuon kiel tutmondan kaj kalkuli nur per ĝi. Tamen unu paŝon al la solvo de l' problemo ni povas fari jam nun per tio, ke ni kreu centran librotendadon kaj kazon por ĉiuj pagoj.

Nunaj eldonistoj ktp. devas montri la prezojn de siaj eldonaĵoj en 25 aŭ pli multaj monunuoj kaj akcepti ankaŭ la montritajn monbiletojn. Tamen por la mensendado la sendado mem estas tro mulekosta, ĉar oni ĉiam (eĉ por la plej malgranda sumo) devas uzi fermitan leteron kaj ofte eĉ enskribitan.

Mi nun volas proponi, ke la eldonistoj kaj vendistoj akceptu transpagilojn de ia centra kazo de unu el niaj oficalaj institucioj. Pli frue ĉiu delegito de UEA havis sian konton en Genève, kaj se nun la Centra Oficejo de UEA akceptus denove malfermi kontojn al ĉiu deziranto, la problemo estus solvita.

Ĉiu firmo kaj vendisto, same ĉiu aĉetanto-Esperantano, havu konton en la „Mosa Banko“ de UEA. Komence ĉiu firmo havos tiom da kontoj, kiom da monunuoj ĝi akceptas por siaj eldonaĵoj kaj vendistoj, sed ĉiu aĉetanto havos unu konton en la mono de sia lando aŭ en la mono, per kiu li povas pagi. Por eviti, ke la fremdlanda mono estu sendata al Genève, sed restu en la propra lando, UEA povus malfermi konton en ĉiu landa ĉefbanko je sia nomo, kaj la Esperantanoj de ĉiu lando enpagus sian monon al tiu konto. La bankoj devus scigi UEA pri tiuj enskriboj en la kredito de l' konto.

Se la nuntempaj kostoj de l' afranko por Svislando estas tro altaj, oni povus elekti alian landon, kie oni tenus la libron, kaj mi opinias, ke Germanlando povus esti elektata kiel librotendado.

Per transpagilo en formo de poŝtkarto ĉiu pagus al iu ajn. Se la sumo estus tro granda, la ricevinto de l' transpagilo povus ĉiam sendi ĝin pli frue al la librotendado de la „Mosa Banko“ por transskribi kaj poste plenumi la mendon. UEA ricevus monon sen procentoj, ne pagus ilin al la kontohavantoj, sed mem ricevus ilin de la diverslandaj

* En ne tro malproklima estonteco ni, sendube, ricevos la eblecon uzi nian monmonon „Spesmilo“, eligitte nomita „Mosa“, kaj tial mi proponas nomi la centran kazon per montrita nomo.

En la hodiaŭa numero ni komencas la publikigon de originala teatraĵo de nia konata samideano kaj L. K.-ano H. J. Bulthuis, esperante, ke per tio ni faros specialan piezuron al niaj legantoj. La stilo de la teatraĵo estas simpla kaj facile komprenebla, la enhavo interesa; oni legas ĝin kvazaŭ rakonton. Pro sia facila kaj laŭfundamenta stilo ĝi ankaŭ bone taŭgas por esti lultegata en kursoj, por ekzercado, tiamaniere ke ĉiu persono de la teatraĵo estos prezentata per alia kursano.

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.
 Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K.

UNUA AKTO.

Aktoroj.

La Patrino, 50-jara
 Johano, ŝia filo, 20-jara, simplulo } du-
 Alberto, ŝia filo, 20-jara, soldato } naskitoj.

Scenaĵo.

Malnovmoda ĉambro. Malfermita fajroloko kun fajro, super kiu kamenkapuĉo. Ambaŭflanke de la kamenkapuĉo po unu fenestro kun fermitaj kurtenoj. Antaŭ ĉiu fenestro po unu seĝo. Unu tablo, dekstre en la meza scenejo. Spinilo kaj seĝo maldekstre de la tablo. Unu ŝranko ĉe la muro dekstre en la antaŭscenejo. Super la ŝranko du bretoj, unu super la alia, kun manĝaĵoj kaj kruĉoj kun akvo kaj lakto. Maldekstre ĉe la muro en la antaŭscenejo benko kun altaj dors kaj brakapogiloj. Po unu pordo dekstre (apud la ŝranko) kaj maldekstre (apud la benko). Sur la muroj kelkaj bildoj en kadroj kaj speguloj kaj horloĝo. Lampo malhele lumigas la ĉambron. Estas malfrue en la vespero. Tempo 1812.

Unua sceno.

Patrino. Johano.

La Patrino ŝpinas, sidante apud la tablo. Johano sidas sur la benko kaj plektas korbon; li laboras tre mallerte kaj de tempo al tempo interrompas la laboron, dum li fikse rigardas antaŭ sin, kvazaŭ droninte en pensoj. Li parolas malrapide kaj kelkfoje levas la dekstran montrifingron por klarigi per tio siajn dirojn. Li aspektas kiel simplulo kaj havas arĝente-blankajn harojn.

Johano (post kiam li laboris kelkan tempon). Patrino!

Patrino (parolante kvazaŭ al infano). Kio estas, Johano?

Johano (rigardante momenton antaŭ sin kaj interrompante sian laboron). Ĉu la mondo estas maljuna — kaj ronda?

Patrino. Jes — tre maljuna — kaj ronda.

Johano (post momento). Kial do maljuna?

Patrino. Miloj da jaroj.

Johano (post momento). Kaj ĝi turniĝas?

Patrino. Jes, seninterrompe ĝi turniĝas.

Johano (faras per la fingro horizontale rondmovadon). Tiamaniere — aŭ — (faras saman movadon vertikale) tiamaniere?

Patrino. Jes, tiamaniere.

Johano (post momento). Kial ĝi faras tion?

Patrino. Mi ne scias —

Johano. Kaj ni ne defalas de ĝi?

Patrino. Kompreneble, ni ne defalas.

Johano (pripensinte). Oni falas tamen de fumturo, ĉu ne?

Patrino. Jes, mia knabo, oni povas falli de fumturo.

Johano (post momento) Patrino! Patrino. Kio estas, knabo? Johano. Kie estas nun Alberto?

Patrino. Li estas en la urbo.

Johano. En la kazerno, ĉu ne?

Patrino. Jes, en la kazerno.

Johano (post momento). Sed kial li estas tie?

Patrino. Li estas en la kazerno tial ĉar li estas soldato.

Johano. Ho, soldato, ĉu ne? — Sed kial do li estas soldato?

Patrino. Tion vi demandis jam centfoje. Vi ne memoras plu?

Johano. Ĉu mi demandis tion jam — centfoje?

Patrino. Jes, mia knabo. Sed tio ne estas grava.

Johano (post momento). Kial do mi demandis ĝin — centfoje?

Patrino. Ĉar vi ĉiam forgesas pri tio, kion oni diras al vi.

Johano. Jes, jes; mi ĉiam forgesas.

Paŭzeto, fulmas kaj tondras.

Johano. Mi ne forgesis pri tio, kion hieraŭ diris la maljuna Heleno.

Patrino. Kion ŝi diris?

Johano. Hieraŭ — kiam mi faris komision, — ŝi staris sur la sirato — kun Berto —

Patrino. Kaj kion ŝi diris?

Johano. Ho, mi memoras. — Ŝi diris al Berto — ke mi havas blankajn harojn —, kaj ke mi estas — idioto —

Patrino. Tion ŝi ne devas diri! Vi ne estas idioto, vi estas, kiel estas skribite en la biblio — vi estas malriĉa en spirito.

Johano. Ho! — malriĉa en spirito!

Fulmas kaj tondras.

Patrino (kovrante siajn okulojn per ambaŭ manoj). Dio, kia batego!

Johano. Patrino!

Patrino. Kio estas, knabo?

Johano (pripensinte). Ĉu tio estis la mano de Dio?

Patrino. Tio estis fulmo kaj tondro.

Johano (pripensinte). Oni tamen diras, ke tio estas la mano de Dio, kiu — kiu frapas la blasfemantojn —

Patrino. Vi ja ne timas tiun manon, Johano, vi neniam blasfemas.

Johano (pripensinte). Mi neniam blasfemas — (Post momento) Ĉu mi estas malriĉa en spirito?

Patrino. Jes. Sed ne malĝoju pro tio, mia knabo, ĉar estas skribite en la biblio: Felika estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Johano (pripensinte, rigardante fikse antaŭ sin). Tio da vortoj kune mi ne bone komprenas.

Patrino. Mi scias, ke vi ne bone komprenas tion. Sed tiel estas skribite en la biblio.

Johano (post momento). Patrino!?

Patrino. Kio estas?

Johano. Legu foje tion!

Patrino. Kion?

Johano. Pri la malriĉaj en spirito.

Patrino. Tio estas skribita en la prediko sur la monto. Tio estas multe tro longa por vi, Johano. Vi ja ne komprenas ĝin. Jam laboru kaj ne pensu pri tiaj aferoj!

Johano (post momento). Ĝi tamen estas trov- ebla en tiu via biblio, ĉu ne?

Patrino. Nu do, mi kontentigos vin. Aŭskultu! (Ŝi prenas la biblion kuŝantan sur la ŝranko kaj legas tre malrapide, dum Johano aŭskultas kun streĉita atento kaj interfingritaj manoj.)

„Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris la monton, kaj kiam li sidigis, liaj disĉiploj venis al li.

Kaj malfermite la buŝon, li instruis ilin dirante:

Novaj kursoj en London de s-o Read, en Dartford de s-o Bridger, en Wimbledon de s-o Kearney. En Sheffield la 22. s. lumbilda parolado de s-o Roome pri vizito al Finnlando; ĉeestis 200 personoj.

Ĉeĥoslovakio.

En Eichwald kurso kun ĉ. 60 p.
En Brůx prof. Murath gvidos kurson.
Tri kursoj de la grupo Eichwald-Pyhanken: unu en Zuckmantel kun 20 p., alia en Klostergrab kun 70 p., kaj tria en Moschen kun 26 p.

Francujo.

La jara kongreso de la Esp. Federacio de la Parisa Regiono okazos en Paris la 13. majo. Programo: labora kunsido (3, rue Thinar), bankedo, vizito al la foiro kaj teatra reprezentado de „La fremda ĉapelo“ per „La Verda Kato“. Informoj donas s-o Couteaux, 3, avenue du Cloche, Aulnay-sous-Bois (Seine-et-Oise).

La nacia kongreso okazos en Limoges, 20—21. majo, en la ejo de la Jura Lernejo. Programo: publika parolado de s-o Cart la 19. s.; la 20. ekzamenoj, kunvenoj de UEA kaj aliaj fakuloj; 14 h. labora kunveno; 19.30 h. bankedo; la 21. reprezentado de „Verda Kato“; la 22. ekskurso al Aix-sur-Vienne.

En Nice, 8. 4., parolado de s-ano Jubleau, ĵurnalisto, en Ateneo, kun koncerto; ĉeestis reprezentanto de l' urbestro. Adreso de s-o Jubleau: 25, rue Léopante.

En Perpignan komenciĝis nova kurso la 27. 4.

Germanlando.

Kiel praktikan novajon la Esp. grupo de Koblenz komencis lernan Esp. instruon por germanoj, gvidatan de s-ano L. Funken, Florinsmarkt 7-a, l.

Italujo.

Udine. — Sub la aŭspicioj de la Popola Universitato ĵus estas malfermitaj du paralelaj kursoj en la Reĝa Teknika Instituto; gvidas s-ano Johano Della Savia, del. UEA. Pli ol 85 gekursanoj, inter ili profesorojn, gestudentoj, librotenistoj ktp. Tiuj ĉi kursoj estas la unuaj, kiuj okazos en Udine (urbo kun preskaŭ 60 000 loĝantoj) de dek jaroj. Ni esperu kontentigan sukceson por nia movado en la ĉefurbo de Friulando. Eble oni fondos grupon.

Litovujo.

Kaunas. — La klopodoj de l' prezidanto de Kaŭna Esp. Societo kroniĝis per sukceso: Litova Ministraro favoris al kongresanoj de la XV-a senpagan eksterlandan pasporton kaj rabaton de 75% por la fervojaj biletprezoj. Nun oni devas esperi, ke la Kongresa Komitato atingos similan rezulton pri la germanaj vizitoj por litovaj kongresanoj: ili estu, se ne senpagaj, almenaŭ ne tiel multekostaj kiel nun (36 000 gmk.). — Ankaŭ estas dezirinda fervoja rabato sur germana teritorio. — N. N.

Mangurio.

Harbin. — La Manguria Esperantista Societo, dorminte dum longa tempo pro diversaj cirkonstancoj, vekigis nun kun alveno de nia propagandisto pastro I. Serisev al Harbin post plena de aventuroj vivo en Japanujo. Estas grandkale organizita propagando, tuŝanta ĉiujn klasojn de la publiko; estas disdonitaj propagandiloj kaj flugfolioj; la loka gazeto metis ĝentile je lia dispono du paĝojn, laŭ liaj bezonoj; raportoj pri Instruista Konferenco en Genevo estas dissenditaj al lernejoj; kurso malfermiĝis por japanaj studentoj en la Ruso-Japana Instituto; katedro de Esperanto estas starigita ĉe la Angla Pedagogia Kolegio; propagandiloj estas dissenditaj en la provincojn; aro da paroladoj estas faritaj en la klubo de sportistoj, ĉe Y. M. C. A., kaj aliaj societoj. Ĉiud mane matene de 11-a ĝis 12-a horo okazas kunveno de Esperantistoj en la halo de Fervoja Societo; tie troviĝas ankaŭ Esp. biblioteko kaj en la legoĉambro sur aparta tablo, ornamata per verda stelo, estas dismetitaj Esp. ĵurnaloj kaj gazetoj. S-o Serisev mem instruas en kelkaj lernejoj.

Urugvajo.

En Montevideo okazis parolado de prof. E. Legrand al membroj de la Ruĝa Kruco. La nacia konsilantaro de l' instruado oficiale rekomendis al la instruistoj ĉeesti tiun ĉi paroladon.

Malsukcesinta Ido-parolado.

S-o ing. D-ro Stür en Praha paroladis la 5. 4. en Ossegg apud Dux (Ĉeĥoslovakio) por Ido. Inter la iom pli ol 50 aŭskultantoj estis 6 idolistoj kaj 28 Esperantistoj el Dux, Brůx, Preschen, Eichwald-Pyhanken k. a. Post parolado de prof. Murath por Esperanto la sukceso de la idolistoj estis negativa.

Por Zamenhof-Monumento.

ni ricevis de s-o Rob. Maraury en Salamanca 10 hispanajn pesetojn.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis: 244. Karl Söderström, Harnäs 1 sveda krono.

Lernejo.

Esperanto-Asocio de l' Saksa Instruistaro.

Okaze de la delegitaria kunsido de la Saksa Instruisto-Asocio (Sächsischer Lehrerverein) nia asocio aranĝis sian 8-an ĉefkunvenon la 26. marto, kiu estis bone vizitata. Oni aprobis unuanime la jaran kaj kasan raportojn. La ĉefa afero estis la parolado de s-o Stud. kons. Lohmann pri „Instruistaro kaj Esperanto“, dum kiu li montris multe da interesaj novaj vidpunktoj rilate al la mondhelpingva problemo kaj ties solvo helpe de Esperanto. Oni unuvoĉe petis la grupon frelital preni sur sin la estrarajn oficojn. Oni decidis, ke ĉia propagando por Ido inter la instruistaro tre malhelpas la mondlingvan ideon. Rondemandoj inter la ĉeestantaro montris, ke en 17 lokoj 87 instruistoj donas kursojn al pli ol 2000 infanoj. La devo de ĉiu membro estas sendi regule raportojn pri la Esp. vivo en sia deĵora loko.

Max Sykora, prov. prezidanto.

Scienco.

La relativeca teorio.

Prof. Chant ĉe Universitato de Toronto asertas, ke la observadoj de la kanada partio de la sun-eklipso lastan septembron provizas atestojn tre favoran al la teorio de Prof. Einstein.

La analizoj kaj la faritaj kalkuloj parte indikas la akuratecon de la teorio, sed ne tute. Pli ol tridek steloj estas rekonitaj sur la fotografaj filmoj. La aktualaj dislokigoj sur la filmoj varias inter 11500-ono ĝis 18000-ono de colo.

La fakto, ke dislokigo ekzistas, estas tute certa, kaj ĝia kalkulo ŝajnas esti proksime al tiu antaŭdirita de Prof. Einstein. Por fine decidi la demandon, estas necese preni ankoraŭ aliajn fotografadojn de la steloj, speciale de la steloj, kiuj estas tute proksimaj al la suno.

J. D. A.
(Laŭ telegramo al „Liverpool Post“.)

Filatelo.

Internacia Ekspozicio de Poŝtmarkoj

okazos en London de 14.—26. majo nunjara. Adreso de la hon. sekretario: Herbert F. Johnson, 44 Fleet Street, London E. C. 4. La proksimuma valoro de la ekspozitaj kolektaĵoj estas du milionoj da sterl. pd. — De 21—25. majo okazos ankaŭ la 10-a Filatelista Kongreso de Granda Britujo; adreso: F. Treather Teery (Robins, Snell & Terry), 123 Victoria St., London S. W. 1.

Skoltismo.

La unua internacia tendaro

de Skolta Esperantista Ligo okazos dum la kvara semajno de julio venonta en la ĝardeno de s-o Haine, bonekonata belga Esperantista profesoro, en la ĉirkaŭaĵo de Bruxelles. Pajlo kaj tendoj estos provizitaj sed ne likovriloj ktp. Ĉiu ĉeestonto devas provizi sian propran necesajn (trancilo, forko, kulero, sako por pajlo, ktp.). La kanalo estas apude por la naĝantoj. La belga agente de S. E. L. kalkulas tri francojn potage por la manĝaĵoj. Vizitoj al trupoj, muzeoj, ktp. de Bruxelles estos aranĝataj. Niaj belgaj fratoj senpaciece atendas nin kaj petas, ke ni venu grandmase. Kiu intencas iri, devas tuj sendi sian nomon al trupestro Norman Both, M. S. P., F. B. E. A., Neiherton, Huddersfield, Yorkshire, Anglujo, kiu volonte sciigos p'nenaj detalojn.

J. W. Leslie,

Eks-subtrupestro, propaganda fakestro de S. E. L.

Internacia Sporto.

Aŭtado.

La konatan konkuron „Terga Florio“ gajnis Sirocci per „Alfa Romeo“ en 7 horoj 18.06.6 min.

Ciklado.

La konkuron Milano-Torino (286 km) gajnis la italo Girardengo antaŭ Belloni.

Naĝado.

La 19-jara argentinino Millian Harrison naĝis en 24 horoj de Marata al Buenos Aires, kun la fluo de l' rivero.

Sea plej famaj naĝistinoj de Novzelando intencas fari sportvojaĝon tra la mondo.

Piedpilkio.

Svisa elito-trupo ludos la 17. 6. en København kontraŭ Danujo, la 20. 6. en Kristiania kontraŭ Norvegujo kaj eventuale poste ankaŭ kontraŭ Svedujo.

Sparta Praha venkis F. C. Nürnberg 1:0.

En Wien okazis la landa ludo Aŭstrio-Italio antaŭ 85 000 rigardantoj; rezulto 0:0.

Frue en la venonta monato la famekonata ludistaro „Arsenal“ de London veturos al Norvegujo kaj poste al Svedujo kaj Danujo, kie ili ludos. La „Arsenal“ ĝis nun, ludante eksterlande, ĉiam venkis.

Ludoj la 14. 4.: Skotlando kaj Anglujo 2:2; Irlando kaj Kimrujo 5:0.

En Paris ĉe Rugbi-ludo Francujo venkis per 14 poentoj kontraŭ Irlando (8 pt.).

Rezultoj en Pyrénées-Orientales (Francujo): Arlequins kaj G. C. Toulousain 3:3. U. S. Perpignan kaj F. C. Lezignan 5:0. A. S. Prades kaj Tarare 5:5.

Saltado.

Starinte salis finnoj Eskola 5,205 m antaŭen kaj Mäki 1,46 m altan.

Ludo kaj Sporto Dresden 1923.

Grandstila ekspozicio de ĉio, kio rilatas al ludo kaj sporto en la plej vasta senco, estos aranĝata en Dresden inter la 15-a de majo kaj 30-a de septembro 1923 en la granda urba ekspozicia palaco kaj la apuda belega parko, kiu estas parto de la mondkonata „Granda Ĝardeno“.

La ekspozicio dividiĝas en kvar partojn: unue la koncernaj industrioj, kiuj montras en du sekcioj modelajn ilojn kaj ejojn por ludo kaj sporto. La dua parto temas pri la higieno rilate al ludo kaj sporto. La tria parto „Ludo kaj sporto en ĉiuj epokoj“ ne nur limiĝas je Germanlando, sed konsideras ankaŭ la antikvajn grekojn kaj romanojn, la rusojn, japanojn ktp. La kvara parto estas dediĉata al la Germana kristnasko-festo“ kaj kiel apoteozo de tiu plej alta porinfana festo vekos la varman interese de ĉiu vizitanto.

Por sportkonkuroj oni nun konstruas sur apudaj herbejoj plenezeran sportejon (stadion), en kiu krom multaj naciaj vetildoj ankaŭ okazos diversaj internaciaj sportrenkontoj, ekz. finna germana piedpilkado, internaciaj skermado, boksbatalo, tenis, kaj hoke-ludoj, kaj sur la rivero Elbe estos aranĝitaj konkursoj de remistoj kaj naĝistoj. Proksime de Dresden, apud la montara urbo Geising, oni aranĝos flugprovojn per velflugmaŝinoj.

El ĉiuj kaŭzoj la vizito al la jam alie tiom vizitinda urbo Dresden estos en venonta somero speciale rekomendinda. Detalojn oni demandu en Esperanto de „Deutsche Jahresschau 1923, Spiel und Sport, Dresden, Ausstellungs Palast“.

J. K.

Gazetaro.

Les Echos, 18. 4. kaj L'Exportateur Français, 17. 4. Raportoj pri Venezia de iliaj korespondantoj. — Aliaj francaj gazetoj pri Venezia: La Petite Gironde, Bordeaux; Le Cri du Nord, Lille; Le Moniteur du Puy-de-Dome, Clermont-Ferrand; Le Courrier du Centre, Limoges. Le Petit Nicaise, Nice, 5. kaj 31. 5. Du bonegaj art. de s-ano Jubleau. Jugoslavenski Lloyd, Zagreb, 14. 4. Detala raporto pri la sukceso de la konferenco de Venezia. Rigasche Nachrichten, 4. 4. Ligo de Nacioj kaj Esp. — 18. 4. Esp. kaj polico. Latvijas Sargs, Riga, 17. 4. Noto pri Venezia. — 18. 4. Esp. kaj polico. Latvija, Riga, 17. 4. Esp. kaj polico. — 19. 4. Art. „Esperanto valodas jautajumā“ de priv. doc. P. Kadikis. Latvijas Kareivis, Riga, 17. 4. Esp. kaj polico. Freiheit, Teplitz-Schönau, 8. 4. Esp. angulo. Brůxer Anzeiger, Brůx, 5. 4. Esp. angulo. Die Rote Fahne, Wien, 17. 4. Esp. movado en Francujo. Lübecker General-Anzeiger, 22. 3. Venezia. — 13. 4. Pri okazinta konferenco de Venezia.

Ja atento de sciencistoj!

Konata profesoro St. Salkauskis preparas verkon Esperantlingvan pri patriotismo kaj nacismo. Tiucele ĉiulandaj samideanoj estas petataj alsendi verkojn pri valoro kaj estonta sorto de nacleco en lingvoj franca, germana, pola kaj rusa, aŭ koncizajn resumojn pri tiusencaj verkoj en aliaj lingvoj, le adreso de J. Mačernis, Kaunas, Litovio, Ukmerges pl. 45. Rekomence estos sendataj Esperantaj eldonitaj en Litovio.

Diversaĵoj.

Por vojaĝantoj al Britujo.

La brita konsulo en Basel donis informon al „Die National-Zeitung“, ke de post 15. aprilo vizo sur pasportoj de svizaj civitanoj vojaĝantaj al Britujo aŭ britaj kolonioj (kun escepto de Gibraltaro kaj Malta) ne estas bezona. Vojaĝantoj al Britujo por akiri laboron devas posedi permesateston de la laborministaro.

Moderigo de brita poŝtarifoj.

Komence de 14. majo la poŝtarifoj el Britujo al alilandaj estis 2 1/2 d. anstataŭ 3 d. por la unua unco. Al la Brita Imperio, la reĝa militŝiparo, ankaŭ al Usono; Egipto kaj Tanger la dua unco kostos unu pencon (1 d.) anstataŭ 1 1/2 d., sed la unua unco restos je 1 1/2.

La Danziga aersŝipveturado.

De E. Milch.

Komence de la jaro 1921 starigis la Danziga Aersŝip-Poŝt servo, la unua linio, kiu ligis Danzig kun Berlin. El tiuj malgrandaj komencoj kreskis dank' al la ekonomia situacio de Danzig la aera komunikado tre rapide en ĉiuj direktoj. Tial ekzistas nun ĉiutagaj (t. e. dum la flugperiodo) komuniko kun Steffin, Berlin, Hamburg, Königsberg, Kaunas, (Kovno), Riga, Memel, Warszawa, Lwów, Smolensk, Moskva ktp.

Certe interesos kelkaj nombroj. La ĉiutaga reto de la tri aersŝip asocioj estis por septembro 1922:

Danziger Luftpost 2750 km

Danziger Luftreederei 580 km

Danziger Lloyd Luftdienst 1435 km,

t. e. kune 4745 km. Ĉe la du unuaj asocioj okazis dum lastaj kvin monatoj 1500 flugoj kun 3600 pasaĝeroj, 7220 kg poŝtendaĵoj, 50 000 kg aliaj sendaĵoj. Kaŭze de la ĉiutaga pligrandigo de la nombro da pasaĝeroj, poŝtendaĵoj ktp., la modernaj Junkers-aeroplanoj jam delonge ne sufiĉas. La veturantoj apartenis al preskaŭ ĉiuj nacioj: danziganoj, germanoj, poloj, angloj, amerikanoj, rusoj, ktp.

De granda valoro por la rapida evoluo de la danziga aersŝipveturado estis la proksimeco de la stacidomo Danzig-Langfuhr.

Por la tuta perfekigo de la placo, aeroplanoj kaj de la tuta komunikado oni ĉiam laboras.

Trad. K. Majorkiewicz.

Partoprenu la Danzigan Postkongreson!
(Vidu ET n-o 150.)

Nekrologo.

Post kiam antaŭ nelonge ni funebriis pro nia mortinta samideano s-ino Wenz, edzino de nia membro Fritz Wenz, ni nun devas anonci la morton de nia 60-jara samideano

Christian Martschinke

(9. 4.). Lerninte Esperanton nur antaŭ 1 1/2 jaroj, li estis unu el niaj plej bonaj Esperantistoj, kiu multe propagandis per serioza kompreno al nia movado. Liaj gesamideanoj, kiuj akompaninte lin sur lia lasta vojo, demetis florkronon kun verd-stelumita rubando sur la tombon, konservos al li plej bonan rememoron.

Esperanto-Grupo de Koblenz.

Recenzelo.

LIBROJ.

Rimarkinda originala Esp. romano.

IDOJ DE ORFEO. Originala romano de H. J. Bulthuis, L. K. Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. 342 pg. 12 1/2 x 18 cm. Prezo 2,25 nederlandaj guldenoj. Propra eldono de la aŭtoro: H. J. Bulthuis, Den Haag, Nederlando, Daguerrestraat 84.

Antaŭ ol detale paroli pri ideo, enhavo, aranĝo, lingvaĵo, stilo, korekto ktp de l' romano, mi diras jam anticipe, ke mi konsideras ĝin kiel rimarkindan verkon de nia originala literaturo kaj ke mi povas rekomendi ĝian aĉeton kaj legadon al ĉiu Esperantisto, komencanto kaj perfektulo, precipe ankaŭ al la junularo.

La romano prezentas la ideon, ke „pesimismo kaj kredo al fatalismo malagrabiligas la vivon“, kaj ke „ĉiu kulturo sian pizon“, sur kiu li devas marŝi, antaŭ ol meti lin en la suojn, por ke ili farigu molaĵ kaj ne ĝenu, t. e. ĉiu aranĝo sin ĉiam laŭ la cirkonstancoj. Kaj tiu ideo estas korigita en la persono de „filozofo“ Johano, kiu vivas inter la homoj sub multaj stranganĉaj cirkonstancoj. Li estas jen riĉa, jen malriĉa, sed ĉiam feliĉa kaj kontenta, ĉiam agante laŭ cirkonstancoj. Li estas keltero, maristo, flegisto de frenezuloj, purigisto de kamentubo, aktoro, promenanta reklamilo kaj ĉe resanĝigilo. Kiam li estas riĉa, li fordonas sian monon por helpi al malfeliĉuloj, kaj li faras bonon al ĉiu, kiu ajn bezonas tion. Tio homo tamen ne povas ekzisti en realo, kaj li ne ekzistas, ne ekzistis kaj neniam ekzistos; Johano neŝiĝis en Fantazio, la Fantazio alportas lin, kaj per la Fantazio li foriras. Li venas nur por ordigi tion, kion la sorto malordigis, ĉar ordinara homo ne povus tion fari; kiam li estas plenuminta tiun taskon, li malaperas.

